

N-ro 2/2008  
20a jaro (2a periodo)



# inter ni dirite

- LA JUNULARA FORUMO

Redaktis Einar Faanes, engaĝigis Judith P. Abrahamsen

## I dette nummeret

av *Inter Ni Dirite*, snur vi ansiktet utover landegrensene til initiativ gjort av Esperantister i vårt naboland Sverige. Forskjellen mellom våre to land er mindre enn kontakten i dag skulle tilsi.

Einar

## Nova nordia retgazeto por junuloj aperos

Ekzistas longa tradicio en la Esperanto-movado por publikigi revuojn. Gravaj ekzemploj estas la ĉefa publikaĵo de Universala Esperanto-Asocio, *Esperanto*, kun sia pli ol centjara historio. Ni ankaŭ havis tiajn revuojn gravajn en Nordio. *Kvinpinto*, la komuna membreorevuo de la nordiaj junularaj Esperanto-organizo, publikigis laste en 2002. Tamen denove aperas novaj revuprojektoj. Iniciatis Carl Mäsak nordian retgazeton por junuloj.

– Mi esperas plejparte krei bonstilan kaj legindan peresperantan forumon, kie junaj skribantoj havos la eblon sin esprimi, diris Mäsak, – Mi esperas, ke la gazeto funkciu iomete kiel vilaĝa puto ĉirkaŭ kiu ni povos renkontiĝi.

La ideo aperis kiam li aŭskultis prelegon de Tomasz Chmielik, iniciatinto de nova revuo *Spegulo*, pri kiom revuoj gravas por la Esperanta movado. Post malmulte da tempo, prezentinte la ideon al la estraro de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo (SEJU), Mäsak ricevis entuziasmajn respondojn, ankaŭ de kelkaj personoj kies kapoj similajn ideojn silente portis.

Mäsak kredas ke nuntempe ekzistas malmulte da kontakto inter la nordiaj Esperantistoj junaj. – SEJU temas tro multe pri Svedio kaj svedaj junuloj, diris li – Mi scias vere malmulte pri la Esperanto-junuloj en la aliaj nordiaj landoj, kaj supozeble tio estas ĝenerala fenomeno. Mi pensas ke tiu manko de

interrilatoj estas granda manko de rimedoj. Laŭ lia opinio, junaj Esperantistoj ofte estas bonaj verkistoj kaj ĝojus uzi la lingvon kaj havi ian projekton komunan. Al mi li parolis pri la Oranĝa Renkontiĝo en Svedio lastaŭtune kiun li rigardas kiel bonan ekzemplon de nordia komunaktivado kun partoprenantoj de pluraj nordiaj landoj.

Kiam *Inter Ni Dirite* parolis al Mäsak, multaj

gravaj demandoj ankoraŭ estis diskutendaj. Ekzemplo estas nomo. Mäsak, en sia unua skizo, kelkajn nomojn proponis. Inter ili estis «Kvinpinto», nomo kiun li mem forŝovis. En Norvegio oni tamen pensis alimaniere. – La norvegoj ŝajne ŝategis la nomon «Kvinpinto», ĝis tiu grado, ke oni eĉ ne konsideris la aliajn nomproponojn. La malnova revuo mem malmulte inspiris lin, malgraŭ la graveco de *Kvinpinto*, li neniam tenis enmane numeron de *Kvinpinto*.

Ankaŭ temojn artikolajn ne diskutis la revuplanantoj. – Mi esperas tutsimple ke fariĝos la gazeto tio, kion elektas ĝiaj skribantoj, konstatis Mäsak kaj daŭre diris Mi esperas ke ni vidos temojn, longetajn diskutojn kaj internumerajn reagojn. Do la formato pli gravas ol la temoj de la artikoloj. Kun li Mäsak nun havas du aliajn skribantojn el Norvegio kaj Svedio, kelkajn tekstkorektantojn. Kelkaj personoj el ĉiuj nordiaj landoj diris ke ili volas kontribui, sed ne scias ĉu ili povas sufiĉon da tempo doni al la projekto.



Carl Mäsak (fotis Robin Rönnlund)

– Ni ja bezonas pliajn skribantojn, estas la konkludo de Mäsak.

– Al mi, la revuprojekto de Mäsak ŝajnas malsimile al *Kvinpinto*. Mi bonvenigas la projekton. Tamen opinias ke papera membrarevuo por la nordiaj junularorganizoj ankoraŭ bezoniĝas ĉar oni devas memori kaj informi neaktivulojn, diris Kjell Heggvoll Ullestad, kiu redaktis *Kvinpinton* ekde 2001 ĝis ĝia malapero en

2002, kiam la novan revuprojekton mi skizis al li. *Kvinpinto* ludis gravan rolon por la nordiaj junularorganizoj Esperantistaj. Ĉiuj membroj de la junularorganizoj en Norvegio, Svedio, Finnlando kaj Danio ĝin ricevis kaj povis legi pri aktualaĵoj, Esperantistaj aranĝoj kaj diversaj aliaj temoj. Do, *Kvinpinto* informis al ĉiu membro en la kvar landoj pri okazaĵoj en la aliaj landoj kaj konatigis ilin per artikoloj pri iliaj hobiaj kaj interesoj.

– Fari gazeton estas granda laboro, precipe por la redaktoro, diris Ullestad, Se la nova retgazeto sukcesu, la aktivuloj devas scii kion ili volas kaj kiajn celojn ili havas.

## Venonta IND

Neste numer av *Inter ni dirite* har materialfrist 2. mai 2008.

Bidrag sendes: nje@esperanto.no

# PONDUS

© Overli. distr. strandoverli@yahoo.com



## Demandoj pri usona literaturo

1. Kiu skribis *Fear and Loathing in Las Vegas* el 1971?
2. Kio nomiĝas la libro de Truman Capote kiun filmoj; el 1967, 2005 kaj 2006; surbazas?
3. La verkisto Edgar Allan Poe vivis dum kiom da jaroj?
4. Kiun sporton Ernest Hemingway plej-multe ŝatis?
5. Kio nomiĝas la rakonto, el 2003, surbazita de *Oliver Twist*, kiun Will Eisner faris?
6. Kie loĝas Cthulhu kaj Yog-Sothoth en la universo de H. P. Lovecraft?
7. Kiu unue skribis la tri leĝojn de robotoj?
8. Kio estas la nomo de sciencfikcia verkisto kiu aperas en kelkaj libroj fare de Kurt Vonnegut?
9. Kiom da romanoj verkis F. Scott Fitzgerald?
10. Robert Langdon, la heroo en *La kodo de Da Vinci*, laboras en kiu universitato?

1. Hunter Thompson (ankau konata per la nomo Raoul Duke). 2. *In Cold Blood* (la filmoj estas In Cold Blood, Capote, kaj Infamous). 3. 40 (li naskiĝis je la 19a januaro 1809 kaj mortis je la 7a de oktobro 1849). 4. Bokso. 5. *Fogin the Jew*. 6. En la malnova urbo R'lyeh. 7. Isaac Asimov. 8. Kilgore Trout. 9. Li finis kvar, la nefinita kvina romano eldoniĝis postmorte. 10. Harvard Universitato.

GUSTAV RESPONDO

— FINO DE INTER NI DIRITE —